
INSTRU-CIRKULERO 2020/02 (decembro 2020)

Neregula informilo pri E-instruado, novaĵoj, projektoj, renkontiĝoj

Per tiu ĉi informilo ni peras interesaĵojn pri instruado, pri eventoj rilate al kursoj, klerigado kaj alvokojn, novaĵojn.

Karaj Gekolegoj,

Ĵus finiĝis la stranga jaro 2020, kiun verŝajne ni ĉiuj alie planis, tamen pro la pandemio multo ŝanĝiĝis kaj vole-nevole ni devis adaptiĝi al la novaj reguloj, nova situacio kaj vivmaniero.

Malgraŭ tio, ke mi provadas per retmesaĝoj dissendi instrurilatajn novaĵojn enlandajn kaj eksterlandajn, informojn pri aktualaĵoj, mi foje-foje sendas tiun ĉi cirkuleron ankaŭ en tradicia paperformo al niaj gekolegoj, kiuj ne aŭ ne regule uzas interreton, por ke ankaŭ ili estu informitaj.

Mi esperas, ke vi ĉiuj estas sanaj kaj ne estis, ne estas infektitaj. Mi deziras al vi bonan sanon kaj aktivan Esperanto-agadon ankaŭ en la nova jaro!



I. Asociaj novaĵoj

I.1. Novaj kotizoj

Ekde jaroj UEA kaj ankaŭ ILEI perdas membrojn kaj la jaro 2020 eĉ pli malfaciligis la financon situacion de multaj asocioj, ja mankis ĉeestaj eventoj, kongresoj, konferencoj kaj kursoj, kiuj gravas kiel enspezfontoj. ILEI havis dilemon, ĉu altigi la membrotizon, ĉu redukti servojn por la membroj (t.e. eldoni malpli da numeroj de IPR en papera formo). La decido estis altigo de la kotizo, do, kun bedaŭro mi devas informi vin pri ŝanĝoj en la kotiz-sistemo ekde 2021. En la supra linio de la tabelo vi vidas la kotizojn de ILEI, kiun sekvas en la dua linio la AGEI-kotizoj.

BV. noti, ke AGEI jam de pli ol 10 jaroj ne altigis sian membrotizon, do la nuna eta pluso helpas al nia landa sekcio havi iom da rezervo kaj daŭrigi sian agadon. Dankon pro via membreco kaj subteno!

Se vi ŝatus fariĝi supera membro, bv. skribi al mi!

Kotizoj EUR	A-landoj IPR papera/reta	A-landoj Supera membro IPR+Juna Amiko papera	A-lando Juna Amiko papera/reta
ILEI	25 / 12,50	40	18 / 11
AGEI	30 / 15	45	

Jen aldonaj klarigoj de Mireille Grosjean, prezidanto de ILEI:

Superaj membroj ricevas nian organon IPR kaj nian revuon Juna Amiko papere. Ni abonu kaj diskonigu nian revuon Juna Amiko! Surpapera varianto de la revuo JA kostas A-lande €18; B-lande €13. Reta varianto de JA kostas A-lande 11 EUR, B-lande 7 EUR. La sugestoj, kiuj aperis dum la debato, estas bonaj kaj trafaj. Ni certe konsideros ilin estontece.

Vi instruantoj kaj instruistoj de Esperanto malkovros lertigajn artikolojn en nia Revuo IPR. Do membriĝu!

Vi, la samaj, povos uzi la enhavon de nia revuo Juna Amiko en via instruado. Do abonu!

Vi, legema kaj progresema persono, scivolema kaj distrema, malkovros interesajn tekstojn en nia kvarkolora kaj belaspekta revuo Juna Amiko. Do abonu!



I.2. Jarraporto

La jarraporton pri 2019 mi sendis kiel regule al ILEI kaj aperigis ĝin kune kun la financa raporto ĉe Dokumentoj sur la hejmpaĝo de AGEI <http://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=97868652>.

Baldaŭ mi verkos la jarraporton pri 2020 kaj sendos al ILEI. Estus bone, se mi ricevus novaĵojn el la federaciaj landoj pri kursoj, instruado, klerigseminarioj, ktp, ke mi povu laŭeble vaston bildon doni pri nia landa sekcio.

Alvoko: Se vi mem aktivis aŭ scias pri E-instruado, instrurilataj novaĵoj en via urbo, regiono, bv. informi min, ke mi enkonstruu tion en la raporton.

Se vi instruas Esperanton en lernejo aŭ gvidas eksterlernejan aŭ retan kurson, bv. ne forgesi registri tion ĉe <http://edukado.net/kursejo>, ja tio estas la centra registrejo por Esperanto-instrudo kaj kolektejo de kursoj por fari statistikon, internacian raporton.

I.3. Jarĉefkunveno

Nia jarĉefkunveno tradicie okazas dum la ĉiujara Germana Esperanto-Kongreso. Ĉar en 2020 GEK ne povis okazi dum Pentekosto pro la kronviruso, ankaŭ la AGEI-jarĉefkunveno devis esti prokrastita. Tamen, GEA sukcese kunsidis tiujare inter 23-25 oktobro en Osterode am Harz (12km-ojn for de Herzberg), do jen ekestis la bona eblo por ni partopreni kaj enkadre de tiu evento organizi la laŭstatutan AGEI-jarĉefkunvenon. La unuan fojon ĝi okazis en t.n. hibrida formo, kun surloka ĉeesto de kelkaj gekolegoj, interesiĝantoj kaj ebligante la partoprenon per interreta Zoom-programo. Bedaŭrinde tiu virtuala formo de partopreno estas ankoraŭ nova, nekutima por la plejmulto de nia membraro, tamen, la ŝanco estas por ĉiuj aŭskulti la raportojn, informiĝi pri novaĵoj, sekvi la diskutojn, alparoli kaj esprimi sian opinion eĉ el fora distanco. Tio estas bona helpo por tiuj, kiuj ekz. pro malsano, pro longa veturtempo, manko de financoj aŭ tempo ne povus persone ĉeesti en la kunveno. Mi ŝatus kuraĝigi ĉiujn por ekkono, ekuzo de tiu platformo kaj esperas, ke pli kaj pli da gekolegoj ekŝatos, ekuzos tiun retan servon por interna komunikado. Ĉiukaze, eĉ en 2021, se jam eblos fizika partopreno en kunvenoj, ni planas utiligi tiun formon de kontaktado kun niaj asociaj membroj.

En 2021 ni denove planas organizi la AGEI-jarĉefkunvenon dum GEK en Frankfurt-Oder/Slubice je Pentekosto (21-24. majo 2021). Novaĵojn pri GEK bv. sekvi ĉe <https://www.esperanto.de/de/dek2021>.

Mallonga raporto:

En 2020 AGEI denove devis plenumi financoficejan kontrolon. Ĉio estis en ordo, la funkciado de la asocio estas trovita laŭstatuta, ni ricevis la agnoskon de komunutileco. Ankaŭ en 2020 mi ĝustatempe ricevis la financon raporton de nia kasisto, Christof Krick. Bonorde okazis ankaŭ la laŭstatuta kaskontrolo. La asocio havas stabilan financon staton kaj celdirektan rezervon ekz. por eldono de nova/j lernmaterialo/j. Dankon al niaj kasisto kaj kaskontrolisto pro la sindediĉa laboro.

En 2020 finiĝis la mandato de nia estraro. Antaŭ la jarĉefkunveno ĉiuj estraranoj esprimis sian deziron plu aktivi en la sekva dujara periodo, do ili estas reelektitaj. Mi dankas al ĉiu pro tiu preteco kaj bona kunlaboro.

II. Eventoj, interesaĵoj en 2020

II.1. Klerigado

Klerigado, pluklerigado de Esperanto-instruistoj lamis en la lasta jaro pro la pandemio. Ne ĉiuj seminarioj kaj klerigesioj de Germana Esperanto-Centro (GEC)/Esperanto-Centro Herzberg povis okazi, aŭ ili okazis nur en reta aŭ en t.n. hibrida formo (parte rete, parte kun ĉeesto de limigita nombro de partoprenantoj). Bela escepto estis la 2-semajna perfektiga lingvokurso inter 10-26 julio (SEP=Somera Esperanto-Perfektigo), kies partoprenintoj ne nur evoluigis sian lingvan kapablon, sed lernis ankaŭ pri instrumentadoj, akiris literaturajn kaj movadajn konojn. La serion de tiuj intensaj someraj kursoj GEC

planas regule oferti, ja ĝi multe utilas al tiuj, kiuj en tiu periodo - eĉ en sia feriotempo - povas aŭ volas dediĉi 1-2 semajnojn al lernado, studado de Esperanto.

Detalojn pri la kurso vi trovas ĉe la hejmpaĝo http://esperanto-urbo.de/blog.php?blog_id=79425883 (menuo Aktuale) kaj same tie raporton pri SEP-5 http://esperanto-urbo.de/blog.php?blog_id=82656788.

Ankaŭ la 15a Tradicia Oktobra Renkontiĝo Pedagogia (TORPEDo) okazis en hibrida formo. Kelkaj prelegantoj (Peter Zilvar, Zsófia Kóródy kaj Martin Ptasinski) estis en la Esperanto-Centro Herzberg, alia preleganto (Anina Stecay) kontribuis al la programo per Zoom. Ni tamen esperu, ke en oktobro 2021 jam denove ni povos organizi la eventon kun ĉeestantaj partoprenantoj kaj utiligante la fakbibliotekon de la Esperanto-Centro.

Kursofertojn kaj klerigseminariojn en 2021 ni anoncos sur la hejmaĝo de AGEI <http://esperanto.de/agei> aŭ ĉe <http://esperanto-urbo.de>. Pri retaj eventoj, aktualizaĵoj bv. informiĝi ankaŭ ĉe <http://eventaservo.org>.

II.2. Kongresoj

Ne UK nek ILEI-kongreso povis okazi en 2020 kiel ĝis nun. Anstataŭ solvo estis la organizado de virtualaj kunvenoj. ILEI partoprenis diversmaniere en la trimonata Monda Festivalo de UEA kaj tre konkrete dum la Virtuala Kongreso komence de aŭgusto. Okazis la tradicia Tago de Lernado, organizita de Marija Belosevic nome de ILEI.

Por nia internacia asocio la ĉefa evento tutcerte estis VEKI, la Virtuala Esperanto-Konferenco de ILEI.

Kun 350 partoprenantoj ĝi estis la plej vasta evento de la Ligo. Dum 7 tagoj abundis la prelegoj, debatoj, prezentoj kaj koncertoj dum 12 horoj ĉiun tagon. Interŝanĝo de ideoj, anoncoj, informoj, diskutoj alportis diversajn fruktojn, novajn servojn. La detalan programon vi ankoraŭ trovas ĉe:

<http://ilei.info> Agado/Kongresoj

II.3. Novaj servoj

- Unu el tiuj estas la nova instru- kaj prelegservo, kiu aperas ĉe <http://eventaservo.org> (informo en la dekstra supra angulo).
- Ekde aŭgusto 2020 la firmao E@I nutras la youtube-kanalon de ILEI aldonante po unu prelegon ĉiun tagon. Tiu valora laboro daŭris ĝis novembro kaj vi trovas la rezulton ĉe <https://www.youtube.com/c/EsperantoEdukadoILEI/videos>.
- La informmaterialo de Klaus Friese ofertas al instruistoj kaj aliaj personoj en lernejoj kaj antaŭlernejoj bazan informmaterialon taŭgan por infanoj. La projekto „Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lernejo” ricevas subtenon ankaŭ de ILEI. La baza informilo ekzistas kiel fonto en Esperanto kaj estas jam tradukitaj versioj en pluraj naciaj lingvoj: angla, franca, germana, hispana, itala, nederlanda, turka.

En la retejo de Klaus Friese (<http://www.esperanto-klaus.de/>) vi povas trovi ĉion en klara tabelo.

La celo de la projekto estas disvastigi la kampanjon al multaj landoj. Necesas pliaj tradukoj kaj homoj prezentantaj la materialon al lernejoj. Vizitu la koncernan ILEI-paĝon: <https://www.ilei.info/agado/projektoj.php> aŭ trovu la broŝurojn en pluraj lingvoj ankaŭ en la retejo de AGEI: <http://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=78063245>

II.4. Novaj libroj

Jen raporto pri du gravaj verkoj, kiuj aperis en 2020 kaj kiujn certe ĉiu instruisto povos bone utiligi.

- pliampleksigita nova eldono de **Plena Ilustrita Vortaro** de SAT, kiun priskribas la germana Esperanto-libroservo jene ĉe <https://www.esperanto-buecher.de/SAT-Plena-Ilustrita-Vortaro-de-Esperanto-2020-PIV-2020>. Samloke vi povas ankaŭ mendi ĝin interrete (66€ kaj sendokosto).

„Tiu ĉi nova eldono, daŭre redaktita kiel la du antaŭaj sub la respondeco de Michel Duc Goninaz kaj Klaŭdo Roux, enhavas aldonajn referencojn al la Naŭa Oficiala aldono de la Akademio, kiu koncernas 209 kapvortojn, nun signitajn per la cifero 9. Aliaj notindaj korektoj estas enkorpiĝo de rimarkoj kompilitaj de Bertilo Wennergren kaj atentigoj de Wang Chongfang, kiu, dum sia laborego super la Granda Vortaro Ĉina-Esperanta, elsarkis multajn eraretojn en la PIV-aj citaĵoj de la Zamenhofa Proverbaro kaj de la Biblio, fontantajn el PIV 1970 sed preteratentitajn.”

- En decembro 2020 aperis la kvara eldono de la grava verko por instruistoj kaj instruemuloj: **Manlibro pri instruado de Esperanto**. La laboro estis farita sub la kunordigado de D-ino Katalin Kováts, la libron eldonis ILEI, Edukado.net kaj E@I kune: <https://manlibro.ikso.net>

Ĝi estas baza fakliteraturo kaj nemalhavebla helpo por ĉiu, kiu interesiĝas pri metodoj, instruas Esperanton aŭ gvidas kursojn, klubojn de esperantistoj. Ĝi kostas 18 € + sendokosto.

Jen detaloj kaj mendilo de la libro: <https://manlibro.ikso.net/>

„La nova eldono havas duoble pli da paĝoj ol ajna libro de la antaŭaj eldonoj. Ankaŭ la strukturo ŝanĝiĝis kaj la libro signife plibeliĝis. Pluraj novaj artikoloj traktas modernajn ilojn, aplikaĵojn, formojn de nuntempaj manieroj lerni kaj instrui Esperanton. La libro donas ideojn por sukcesa informado pri Esperanto, organizado de lingvaj eventoj, funkciigo de standoj kaj efika argumentado pri Esperanto.

La legantoj ekkonas sukcese funkciajn Esperanto-centrojn, kiuj povas stari kiel modeloj por la cetero de la movado. Listo de ĉiutipaj literaturaj verkoj konsilas pri (mem)klerigado.

La libro trairas de paŝo al paŝo la tutan proceduron de instruado, ekde la informado kaj planado de kursoj kaj lecionoj, ĝis la realigo de kursoj, inklude stimuladon, taksadon kaj de la laboro kaj de la lernoatingaĵoj. Ankaŭ pri la ekzamenoj; movadaj, ŝtate agnoskataj KER-ekzamenoj kaj naciaj versioj legeblas multe en la Manlibro. La teorion kompletigas multaj konkretaj ekzemploj kaj ekzercoj.

La orientiĝon de la legantoj helpas librofino kvar diversaj indeksoj, kiuj ebligas rapide trovi la bezonatajn informojn kaj helpon.”

Interkultura Centro Herzberg (ICH) mendis plurajn ekzemplerojn por ŝpari la sendokostojn, tiel ĝi estas aĉetebla en la sidejo de AGEI en Herzberg. Se vi ŝatus aĉeti la Manlibron, bv. skribi al mi.

III. Ekzamenoj

III.1. La Internaciaj Ekzamenoj de ILEI / UEA

Ili plu ekzistas kaj utilas. Kompreneble ĉefe en Eŭropo homoj preferas akiri KER-atestilon pro la fakto, ke tiuj KER-atestiloj estas internacie kompareblaj. La ILEI/UEA ekzamenoj estas movade agnoskitaj.

Detaloj pri tiuj movadaj ekzamenoj estas troveblaj ĉe <https://www.ilei.info/agado/ekzamenoj.php>

Novtipa ekzameno de ILEI: KoMo

Laborgrupo estas starigata por krei tiun novan ekzamenon, kiu kompletigus la KER-ekzamenon. La celo estas ekzameni la Kulturajn kaj Movadajn konojn, pro tio la nomo KoMo.

III.2. KER-ekzamenoj

Pro la pandemio ankaŭ la ekzamenebloj estis reduktitaj en 2020. Tamen, en novembro estis organizita la 9a Tutmonda Ekzamentago, kiun partoprenis sepdeko da kandidatoj en 12 urboj de 9 landoj de kvar kontinentoj, inter ili la unuan fojon en Afriko

Mi nepre rekomendas trapason de KER-ekzameno (por instruemuloj C1-nivelo). Pri novaj ekzamenofertoj en 2021 vi povas informiĝi ĉe <https://edukado.net/ekzamenoj/ker>

III.3. GEA/GEI ekzamenoj

Se denove eblas organizi ĉeestajn kursojn, instrukapabligajn seminariojn, la Germana Esperanto-Centro en Herzberg ofertas **trejnadon kaj la ekzamenojn C** (supera ekzameno pri lingva kapableco) kaj **D** (kursestra ekzameno). Interesiĝantoj skribu por detaloj al esperanto-zentrum@web.de

Dezirante bonan, sukcesan novan jaron, kun multaj salutoj, Zsófia Kóródy AGEI-prezidanto